



LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

Kosto de abono por jaro: Skandinavaj kronoj 4,00 = hungaraj kronoj 5,50 = frankoj 5,75 = rubloj 2,00 = germanaj markoj 4,50 = portugalaj rejsoj 1200 = brazilaj rejsoj 2500 = dolaroj 1,25 = ŝilingoj 4 1/2.

Pago por anoncoj: 15 oeroj = 20 heleroj = 20 centimoj = 8 kopekoj = 15 pfenigoj por duonpaĝa petittinio. — 10% rabato por duonjara, 25% rabato por tutjara anoncado; ĉe granda anoncado ankoraŭ pli da rabato laŭ reciproka konsento.

Adreso de l' redakcio: **Paul Nylén**, en la redakcio de »Vårt Land«, **Stockholm**, Sverige (Svedujo). — Adreso de l' administracio: **Paul de Lengyel**, en **Szegzárd**, Magyarorszáq (Hungarujo). — Kun manuskriptoj kaj ĉio tuŝanta la tekston oni sin turnu al la **redaktoro**; pri abono, ekspedado, anoncoj kaj ĉiuj monaj aferoj oni devas turni sin al la **administranto**.

KIUJ ESTAS

la tri plej grandaj homoj, kiuj vivadis dum la pasinta, 19-a, centjaro?

Karaj, alte estimataj kolegoj en la espero pri unu neŭtrala lingvo internacia! Permesu, al amiko, ke li faras proponon al vi ĉiuj partopreni en la respondado de la supreskribita demando.

La lastaj cent jaroj, kiuj havis finon la 31. decembro 1900, vidis multajn homojn, kies laboroj kaj agado donis postsignojn, longtempe videblajn kaj sentebajn en la vivo de la homaro. Unu el ili estas admirata kaj admirinda pro sia politika aŭ milita sagaceco, alia pro poezia kaj scienca arto; ni vidis profunde pensantajn filozofojn, glorajn verkistojn je ĉiaj regionoj de la homa scio, grandajn muzikistojn, pentristojn, inĝenierojn kaj elpensintojn. Kuraĝaj viroj penetris ĝis lokoj de la Nordo kaj de la Sudo antaŭe nekonataj, aliaj homoj, ne malpli kuraĝaj, bataladis — eble dum la tuta vivo — por granda ideo kaj eĉ


oferis la vivon pro la servo de la homaro. Oni ja tute ne povas elkalkuli kaj nomi ĉiujn »grandajn« homojn, virinojn kaj virojn, kiuj kondukadis la progreson de la homa mondo. Sed kiu inter ili do estas la plej granda?

Ni proponas, ke la legantoj de la »Lingvo Internacia« volu diri ĉiu sian opinion, nomante unu aŭ du aŭ tri (sed ne pli ol tri) homojn de la 19-a centjaro, kiuj laŭ ilia opinio plej multe meritas la titolon »grandaj«, kune kun la motivoj, kiuj kaŭzas tiun ĉi opinion.

Oni volu uzi *ne tro multe da vortoj*, sed skribi mallonge. Ĉar alie, se, kiel ni kore esperas, multaj respondos, tiuj ĉi respondoj kun la motivoj de ĉiu postulus eble tro da spaco de la gazeto.

Tiu ĉi propono nun farita kompreneble nur tiam estos ebla, se la estimata Redakcio vo'as presigi tiun ĉi artikoleon kaj poste ricevi kaj en la *L. I.* presigi la venontajn respondajn artikolojn. Sed, se la Redakcio ĝin trovas esti bona, ĝi eble faros tiel.

Ma. Am.



Mi amegis . . .

Mi amegis du rozajn lipetojn,
Kiu spiris konsenton al mi,
Tiaj rozoj ekzistis en vero,
La konsento, ĝi estis fikci'.

Mi amegis du bluajn okulojn,
Kiu versis esperon al mi,
La okuloj ekzistis en vero,
La esper' estis plen-utopi'.

Mi amegis fraŭlinan koreton,
Kiu spiris bonecon de Di',
La koreto ekzistis en vero,
La bonec' — en la sonĝo de mi.

La realo, la efektiveco,
Ĝi de longe jam mortis por mi,
Kaj fortika, vivema montriĝis
Nur la sonĝ', l' utopi', la fikci'.

Amiko.



RIMARKITAĴOJ.

La plejparto de grandaj elpensitaĵoj apartenas al viroj. Ili estas devigitaj al elpensado, ĉar ili ne posedas harpinglojn por siaj laboroj.

*

La frazoj estas la ridinduloj de la pensoj.

*

Ekzistas malmultaj virinoj kiuj balbutas. Ili ne havas por tio la tempon, ĉar ili devas tiel multege diri!

*

En la edzeca stato viro kaj virino estas unu. Tio estas nedisputebla; sed, kiu estas la unu — jen alia afero.

*

Virino, kiu estas bonema kaj belega, estas nomata *feino*; tiu, kiu estas nur bona, estas nomata *anĝelo*; tiu, kiu estas nur be-

lega: *demono* kaj *ĉiu*, kiu estas nek bonega nek belega, estas nomata

*

La monoj estas la plej bonaj amikoj de la homoj. Vere, ili similas al aliaj amikoj entute: ili estas la unuaj, kiuj je la malfeliĉo turnas al ni la dorson.

*

Progresado estas peze ŝargita vagonaro, kiu neniam estos atinginta la finstacion.

*

La mondo havas lokon por ĉiu homo. Tre vere, sed ordinare alia homo, ĉagrenige, sin trovas sur tiu ĉi loko.

*

Idealisto: Ho, amiko mia, kia bela mateno, kia alta ĉielo, kia malvarmetiga aero! Oni fariĝas preskaŭ renaskita, oni sentas kiel la sango . . . — Materialisto: Jes, estas vera domaĝo ke oni ne havas kapdoloron.

Kolcktis P. Ahlberg.



LA DU RESTORACIOJ.

En varmega posttagmezo de julio, kiam mi estis longe marŝinta kiel en dezerto sur la granda vojo polva, subite aperis antaŭ mi areto da blankaj domoj.

Tio estas la haltejo St-Vincent, konsistanta el kvin aŭ ses domoj, kelkaj grandaj fojnejoj kun ruĝa tegmento, unu trinkejo sen akvo meze de malgrasaj figarboj, kaj je l' fino de l' vilaĝo du grandaj restoracioj rigardantaj unu la alian je ĉia flanko de l' vojo.

Miriga estis la naĵbareco de tiuj restoracioj.

Je unu flanko, nova, movema, vivoplena domego kun ĉiuj pordoj malfermitaj; poŝtveturilo haltiĝinta antaŭe: fumantaj ĉevaloj, kiujn oni dejungis; vojaĝantoj drinkantaj rapide sur la vojo, en l' ombro mallarĝa liverita de l' muroj; korto embarasata per muloj kaj ŝarĝoveturiloj; interne krioj, insultoj, pugnofrapoj sur la tablojn, alfrapo de glasoj, bruego de bilardoj, eksaltantaj korkoj de limonadboteloj, kaj kovrante ĉion tion, voĉo gaja, tinta, kiu tremigante la vitrojn kantis:

La bela Margareto
Matene sin levigis,
Argentan kruĉon prenis,
Kaj iris al la fonto . . .

La kontraŭa domo dume estis silenta kaj ŝajne forlasita. Herbo sub la pordego; fenestraj kovriloj rompita; super la pordo, fera branĉeto tute rusta elpendanta kiel malnova plumajo, sojlaj ŝtupoj rerektigitaj per ŝtonetoj de la vojo. Cio tio tiel mizera, tiel kompatinda, ke estis vera bonfaro haltigi sin tie por drinki iom.

Enirante mi ekvidis vastan ĉambron dezertan kaj malgajan, kiun la blindiga helo penetranta tra tri grandaj senkurtenaj fenestroj ŝajnis ankoraŭ pli malĝoja kaj pli dezerta.

Kelkaj tabloj lamaj, sur kiuj kuŝis glasoj malhelaj pro la polvo, bilardo traŝirita, kiu

prezentis siajn kvar pilkpoŝojn, kvazaŭ petante almozojn, flava sofo, malnova kalkulilo, dormadis tie en varmo peza kaj malsaniga.

Kaj muŝoj! muŝoj! Tiel multajn mi neniam vidis; ili estis gluitaj po aretoj je la plafono, sur la vitroj, en la glasoj . . . Kiam mi malfermis la pordon, ekestis zumado, tremetado de flugiloj, kvazaŭ mi enirus abelejon.

Je l' fino de l' ĉambro, apud fenestro, staris virino tre fervore rigardanta eksteren. Mi ŝin alvokis dufoje:

— He, mastrino! — Ŝi turnis sin malrapide kaj vidigis mizeran vizaĝon de vilaĝanino, sulkigitan, kavigitan, terkoloran, enkadritan per longaj rubandoj de duberuĝa punto, kielajn kutimas portadi nialandaj maljunulinoj.

Ŝi tamen ne estis maljuna, sed tute velkinta pro la plorado.

— Kion vi deziras? — ŝi demandis viŝante siajn okulojn.

— Sidadi momenton kaj trinki ion . . .

Ŝi rigardis min mirigite, ne sin movante, kvazaŭ ŝi ne komprenus min.

— Ne estas tio ĉi restoracio?

La maljunulino sopiris:

— Jes, ĝi estas restoracio, se vi volas . . .

Sed kial do vi ne iras kontraŭen, kiel la ceteraj? Tiu estas multe pli gaja . . .

— Ĝi estas tro gaja por mi . . . Mi preferas resti ĉe vi.

Kaj ne atendinte ŝian respondon, mi sidigis antaŭ tablo.

Kiam ŝi plene konvinkiĝis, ke mi parolas serioze, la mastrino komencis iri kaj veni, kaj ŝajnis tre okupata, malfermante tirkestojn, movante botelojn, viŝante glasojn, ĝenante muŝojn.

Tiu ĉi vojaĝanto, kiun ŝi devis servi, estis videble granda okazaĵo. Ifoje la mizera virino ekhaltis kaj prenis sian kapon per ambaŭ manoj, kvazaŭ malesperante sukcesi. Poste

ŝi eniris la apudan ĉambron; mi aŭdis kiel ŝi movis grandajn ŝlosilojn, turmentis serurojn, serĉis en la pankesto, blovis, viŝis, lavis tele-rojn. Kelkafoje profundan sopiron, ekploron malbone sufokatan.

Post kvarono de horo aperis antaŭ mi telero da sekaj vinberoj malfreŝa pano malmola kiel ŝtono, kaj botelo da acideta vino.

— Vi estas servita, — diris la stranga estaĵo, kaj ŝi rapidis al sia loko apud la fenestro.

Dum mi trinkis, mi klopodis paroligi ŝin.

— Ne ofte venas klientoj al vi?

— Ho, ne, sinjoro, neniam... Kiam ni estis solaj en la distrikto, estis alie; ni tiam havis la stacidomon, manĝojn de ĉasistoj dum la sezono, veturigistojn en la tuta jaro... Sed de l' tempo kiam la najbaroj ekloĝis tien ĉi, ni ĉion perdis... Oni prefere iras kontraŭen. Oni trovas, ke ĉe ni estas tro malgaje... Estas vere, ke la domo ne estas tre agrabla. Mi estas nebela, mi estas febrema, miaj du filinoj jam mortis... En la kontraŭa domo oni senĉese ridas. La mastrino de l' restoracio estas Arlesanino, bela virino kun punktoj kaj triobla ora ĉeneto ĉirkaŭ la kolo. La veturigisto, kiu estas ŝia amantulo, alkondukas al ŝi la poŝtveturilon. Krom tio ĉi estas aro da allogantulinaj kiel servistinoj... Tial al ŝi venas klientaro! Ŝi havas la tutan junularon de Bezonces, Redessan, Tonquières. La ŝarĝoveturigistoj prenas alian vojon pli longan, nur por pasi antaŭ ŝia domo... Dume mi restas tie ĉi la tutan tagon, konsumiĝante, sen iu...

Tion ĉi ŝi diris distrate, seninterese, kun la frunto ĉiam premata sur la vitro. Videble

okazis en la najbara restoracio io tre okupanta ŝin.

Subite, je l' alia flanko de l' vojo fariĝis granda movado. La poŝtveturilo ekrulis meze de la polvo. Oni aŭdis bruon de vipoj, trumpetaĵon de l' veturigisto, voĉojn de knabinoj alkurintaj ĉe la pordon kaj kriantaj: »Adiaŭ! adiaŭ!« kaj super ĉio tio la fortegan kanton antaŭan, kiu komencis denove:

Arĝentan kruĉon prenis
Kaj iris al la fonto;
Ŝi tie ne rimarkis
Ke venis tri soldatoj...

Je tiu voĉo, la mastrino tremetis en la tuta korpo, kaj turnante sin al mi, diris mallaŭte: »Ĉu vi aŭdas? Ĝi estas mia edzo... Ne estas vere, ke li kantas bone?«

Mi rigardis ŝin mirigita.

— Kiel? via edzo?... ĉu ankaŭ li iras tien?

Tiam ŝi, kun akcento malĝoja, sed tre dolĉa:

— Kion vi volas, sinjoro? Tiaj estas la viroj; ili ne amas vidi larmojn, kaj mi ĉiam ploras de l' tempo kiam mortis miaj infanoj. Kaj tiel malgaja estas tiu ĉi granda domo, kien neniam iu venas! Tial, kiam li tro enuas, mia malfeliĉa Jozefo iras kontraŭen por drinki, kaj ĉar li havas belan voĉon, la Arlesanino lin petas kanti... Silentu, li rekomencas.

Kaj tremante, kun dikaj larmoj, kiuj malbeligis ŝin plimulte, ŝi restis tie, antaŭ la fenestro, ravita, aŭskultante sian Jozefon, kiu por la Arlesanino kantis:

... L' unua ekparolis:
»La Bela! Bonan tagon!«

Laŭ franca rakonto de *A. Daudet*
mallongige trad. **SAM.**



BAKALŬM.

La turka vorto *bakalŭm* signifas: *ni vidos*.

Komercisto alvenis Konstantinopolon, por ke persone prezenti la plendskribon al la granda veziro pro la maljusta decido de provinca juĝejo. La granda veziro ne rigardante la plendskribon, rifuzis al la komercisto. Apenaŭ la ministro eldiris sian decidon, la komercisto komencis kisi la randon de lia vesto, alvokante sur lian kapon la benon de Dio. Mirigita per tiu ĉi konduto, la grandsinjoro demandis:

— Kion vi faras? Per mia decido vi perdis proceson, vian tempon kaj monon, kaj pro tio vi benas min?

— Ho, granda veziro! — respondis la komercisto, — vi en unu momento decidis

mian proceson kaj rifuzis al mi. Gloro kaj danko al Dio! Alia veziro kun sia *bakalŭm*, *bakalŭm!* tenus min tie ĉi tutajn monatojn kaj fine donus al mi la saman respondon. Nun almenaŭ mi povas reveni al miaj aferoj kaj al mia familio, ne perdante tute vane mian tempon kaj monon.

La granda veziro ekridis, fariĝis prudenta, konsideris la aferon kaj ŝanĝis sian rapidan decidon.

En la nuna tempo ekzistas ankaŭ multaj grandsinjoroj kaj institucioj, kiuj anstataŭ simple rifuzi al la petanto trompas lin per siaj senfinaj »*bakalŭm*, *bakalŭm!*«

V. Laskin.



ĈE LA RAPIDFLUAĴO.

El Pentraĵoj de supra Norrland*, verkitaj de

MARIA RIECK-MÜLLER.

Ĉu vi alestis tie — ĉe la rapidfluaĵo Fällfors? — Eĉ do ne! — Metu do sur viajn ŝultrojn la vojmanĝan korbon el betuŝelo kaj prenu la migran bastonegon en vian manon!

Eble vi loĝas tiom malproksime de tie, ke la vojo estos al vi longa? Sed sciu do, ke estonte alveninta vi sentos dankemon pro la laceco, — dankemon pro la ripozo en tia belegajo!

Sole *tio* ke — post kiam oni iradis tra senfina, malgrasa pinglarbaro, kie nordcerva

musko kaj likeno eĉ ne donas al la vakciniaj trunketaĵoj la permeson kreski — sole *tio*, ke oni do tute subite staras meze en la plej verda kreskriĉaĵo — estas ja mireginda!

Ĉu vi volas aŭdi pli?

Estas ja longa tempo post kiam mi estis tie je la unua fojo, sed malfrue *tio* foriros el mia memoro.

Inter kriplekreskaj pinglarboj, kie griza musko kreskas laŭlonge sur la branĉoj kaj ĉia ventmurmuro estas veplena ĝemo pri nutro,

* Norrland = la norda duono de Svedujo.

tie sin trovadas prospere la malgajanimeco kaj agonio. En tia arbaro ne kantas la birdoj, kaj ĝi estas nomata: la griza arbaro, la arbaro de l' malriĉeco.

Oni iras tie en teruro — la izoleco kaj silento jam ne estas elporteblaj. Tiam eklumiĝas per unu fojo ĉirkaŭ oni, kaj la muĝo de akvo estas aŭdata tute proksime.

La vojo komencas dekliviĝi krute, kaj profunde, preskaŭ falrekte tie malsupre, fluas la rapidrivero en turneturniĝoj kaj sinvolvoj.

Ĝi trairas inter altaj, vestitaj per arbaroj bordoj, kie amasetoj da helfoliaj betuloj brilas kontraŭ la malhela pingloarba verdaĵo kvazaŭ junaj virgulinaj de l' mirrakonta arbaro vestitaj en traklaretaj vualoj.

Montspinoj kun molaj, kurbaj linioj kaj montspinoj, kiuj kuraĝe sin rompas en strangaj formoj, aperas poste kaj detoniĝas malproksime, malproksime trans ĉio en violkolora nebulo, violkolora kun roza supre kaj bluverda plej supre.

Kaj meze fronte — kie la vojo finiĝas — estas griza domo vilaĝana tute apud la rando de la rivera altbordo. Supren laŭ la krute klina altbordo rampas altaj, blankatrunkaj betuloj kun tute sudlanda kreskemeco, kaj plej supre ili staras kvazaŭ sur posteno antaŭ la maljuna domo vilaĝana. — Ili volas gardi ĝin, ke ĝi ne subglitu en la riveron malsupre.

Kiam la sunlumo trafiltriĝas inter la foliaĵo, verda brilajeto sternas sin sur muroj kaj fenestroj, tiel ke oni ne rimarkas, kiom nepre griza estas efektive ĉio tio ĉi.

Tuj apud la korto aliĝas herbejoj kaj hordeskampoj en suka verdecio kaj estas enkadrigitaj de altkreska arbaro, kies linioj kuniras en unu sama kun la montspino. Estas energia profunde-verda arbaro, kiu kreskigis sin forta dum la penado atingi supren sur la krutaĵoj.

Kiel trankvile tie estas — kaj kiel bele!

Oni aŭdas sole la unuton bruon de l' akvofalo, de kiu nur la ŝaumfumo estas vi-

debla — kaj tiam, kaj tiam la sonorileton de soniloporta bovino malproksime en la paŝtejo.

Sur la ŝtuparo de l' domo sidas knabino — ŝi estas eble dekkvarjara. Ŝi estas pala kun nigra tufa haro, kiu pendas senorda, ĵetante profundan ombron super la okulojn. Kaj kiaj okuloj! Nuancantaj en lumajo kaj mallumajo, kiel la arbaro ĉirkaŭ ŝi! Tia esti ŝi devas — la filino de river' kaj arbar'.

— Ĉarma infano, pri kio vi enpensas?

— Ĉu vi aŭskultas la bruon de l' rivera rapidfluaĵo? Ĉu vi aŭdas fabelojn kaj kantojn, kiujn neniu alia povas aŭdi?

Ŝi leviĝas kaj eniras la domon.

Tie interne en granda ĉambro staras la patrino mem — tabakan pipeton en la buŝo — ĵus levante de l' fajro la terpoman poton.

Ŝi estas brunethaŭta, mezaĝa virino kun belaj, energie skulptitaj trajtoj. La knabino sur la ŝtuparo ne heredas sian belecon sole de river' kaj arbar'.

La familio, kiu estas multa — naŭ personoj — sidas ĵus apud la manĝotablo, kie la tuta manĝilaro konsistas en lignaj kuleroj.

Ĉiuj ili estas brunetuloj, escepte la patron, kiu — maljuna kaj grizhara — similas pli al la ordinara vilaĝa popolo en tiu ĉi regiono.

La manĝaĵo estas simpla — kiel koutstante ĉe la popolo en supra Norrland — pano kun peceto da butero kaj pelvo da faruna kaĉo maldensa kune kun terpomoj. Fininte la manĝon oni kunigas la manojn en danko, delekas zorge la lignajn kulerojn kaj metas ilin en la tirkeston de l' tablo, kaj ĉiu disiras al sia okupado.

La patrino estas sufiĉe tiom parolema kaj preparolas inter ĉio iom pri ilia vivo kaj laboro. Tie sur la Terkolo — tiel estas nomata ilia korto — ili loĝas de multaj jaroj, kaj ili opinias ja mem, ke tie estas bele — kaj la Fällfors ilia — jes, ĝi estas la plej bela. Tie, ankaŭ, la maljunulo tra jaro post jaro rikis la sanon kaj vivon en la laboro de flosado.

La grandegaj trabaroj, kiuj amasiĝas supre al la akvofalo, certe ne estas facile manovreblaj!

Kaj se oni deziras alveni tien supren por vidi, ekzistas do neniu pli bona remisto ol estas la plejmaljun-knabo ilia.

Li estas ankaŭ efektive brava — la plejmaljun-knabo — elasta kaj nigrabukla. Per fortaj remsvingoj li pelas la ŝipeton antaŭen, kaj sidanta neferminte la ĉemizon sur la brusto kaj reŝovinte sur la nukon la molan larĝombran ĉapelon, lia vido memorigas al oni la gondol'erojn de sudlando — cigana sango ofte enŝteliĝas tie ĉi supre. Oni povus kredi ke oni malrapide fluas sur la akvo de *laguno*... Sed jen la efektivaĵo alproksimiĝas pli kaj pli kun surdiganta bruego, kaj la rapidrivero iras batala kaj ekscitita. Estas sendube plej bone tiam suriri la bordon! Riĉombra arbora vojeto, kie birdoj loĝas kaj kantas sur la arboj, serpentas laŭlonge la krutbordoj kaj supren al la akvofalo. Kaj tie — ekstreme sur la ŝtonegoj — oni estas ĉirkaŭita de bolantaj, muĝantaj amasetoj de akvo, kiuj ĵetas sin malsupren en surdiganta bruego kaj ŝprucegas ĉirkaŭ kaj super si vualon de plej delikata ŝaŭmfumo.

La altaj, perpendikularaj bordoj estas vestitaj ankaŭ tie ĉi per riĉe nuancita arbaro. Tie ĉi kaj tie sovaĝaj, nigraj ŝtonegoj sin disrompinte fariĝis antaŭklinajoj kun aroj da sukaj filikoj en la fendoj.

Je la supra flanko de l' akvofalo la rivero ŝaŭmas kaj batalas sin blanka,

ĝis ĝi iom pli proksime faras subitan ekkurbon.

Estas atakanta amaso da koleraj, blankaj ondoj, kiuj ĵetas sin tie ĉi unu super la alian kaj laboras ĝis furiozeco en la vetbatalo por atingi la unua la celon. Kaj kiam ili jen ĵetas sin malsupren de la krutaĵo en unu grandega maso, brilas kaj helas ĉio kiel smeraldo inter la ŝaŭmo.

Belas kaj bolegas, kaj la rompondoj estas reĵetataj kontraŭ la ŝtonegoj kun krieganta bruego. Kaj kiam la traboj sekvas en la furioza danco, ili estas ĵetataj suben kontraŭ la subakvaj ŝtonegoj kaj ofte ili estas rompitaĵ, kiam ili denove elnaĝas.

Sed ne estas konsilinde longe rigardi malsupren en tion ĉi ensorĉantan altirantan! La kapoturnsento staras en embusko, kaj ve al tiu, kiu ne estas la pli forta! En la lageto tie malsupre la riverakvo sin larĝigas en senzorga trankviliĝo post la kuraĝa salto, kaj tie la sovaĝaj anasoj sin trovas. Ili naĝas volonte kontraŭ la rapidfluo — kaj en la sunlumo la blankaj deĝegnoj sur iliajflugiloj brilas simile al la ŝaŭmo, dum ili balanciĝas leve kaj malleve kun la ondoj.

Tie ĉi la dolĉeco de la trankvilaĵo metas sin sur onin, kaj ĝi estas sentata boniga post tia ĉi furioza, timinda, sed loganta belaĵo, kiu ĵus antaŭe tenis onin kaptita.

Ho, ankoraŭ unufoje mi diras al vi: Metu la vojmanĝan korbon sur viajn ŝultrojn kaj prenu en vian manon la migran bastonon!

Tradukis P. Nn.



Libera homo.



Oni min naskis ne demandinte
Ĉu mi ĉi tion deziris,
Oni devigis min soldatiĝi
Kaj al batalo min tiris.

Oni trapafis al mi la kapon,
Kvankam mi tion ne volis,
Kaj oni ĉiam min en la vivo
»Homo libera« titolis.

Amiko.



❖ LA NIGRA PERLO. ❖

— Franca rakonto. —

Aden, la Gibraltar de l' araboj, estas konstruita sur malvarmiginta lastavolego kaj tial en ĝi ne estas trovata natura trinkakvo.

Tio ĉi min interesis.

— Ĉu oni ĝin anstataŭas per pluvakvo? mi demandis mian amikon *Pujol*, en kies domo mi pasigis kelkajn tagojn dum mia revojaĝo el Hinujo.

— Kiam pluvas, la publikaj putoj pleniĝas, — klarigis min *Pujol*, la franca konzulo en Aden. — Sed, malfeliĉe, de la lasta pluvado jam pasis kvia monatoj.

— De kie estas do ĝi? Ni ja trinkis akvon hodiaŭ matene.

— Fabrika akvo, amiko. La angloj tiel delikate distilas la marakvon, ke ĝi apenaŭ estas diferencigebla de la fontakvo. Oni devas malavare pagi por tiu ĉi arta akvo, kaj mi, ekzemple, pagas por ĝi ĉiumonate cent frankojn.

— Cent frankojn?

— Jes, ĉar ni bezonas tiun ĉi akvon ne sole por la trinko, sed ankaŭ por la kuirado, eĉ por la banejo de mia edzino, ĉar ŝi ne povas toleri marakvon.

— Kaj ankaŭ la araboj pagas por la akvo?

— Ne, ili devas esti kontentaj je tiu akvo, kiun oni alportas de la montoj, el la malproksimo da ĉirkaŭ 28 kilometroj. Malgusta, malpura akvo; ĉiuspecaj vermetoj naĝadas en ĝi. Sed la distilita akvo estas kara, — la polico eĉ ne permesas, ke oni vendu el ĝi ankaŭ al araboj. La malmulta trinkebla akvo estas apenaŭ sufiĉa por la eŭropanoj, anglaj garnizonoj kaj ŝipanoj alvenantaj en la havenon.

Kiam mi estis tiom klarigita pri la akvo-situacioj de Aden, mi iris kune en la konstruaĵo de la konzula ofico, kie sinjorino *Pujol*

akceptis nin. Aminda, ĉarma Parizanino, kiu sendube meritas la amon de sia edzo. Kredeble ankaŭ ŝi treege amis mian amikon, ĉar ŝi nur antaŭ kelkaj monatoj sekvis lin el Francujo; kaj estas nemalgranda sinifero, se tia juna virino forlasas Parizon kaj transmigras en tian mizeran landon.

Sinjorino *Pujol* rakontis, ke ŝi havas tie nenian societon. Ŝia tuta konata societo konsistas el du personoj: unu strangagema anglino, kiu preskaŭ nenion parolas france, — kaj la mastrino de la hotelo »*Universum*«, kiu pli bone povas sin okupi je araboj kaj muloj, ol je sinjorinoj. Mi komencis esprimi mian bedaŭron, sed ŝia edzo min ŝerce interrompis:

— Mia edzino ne estas sincera.

— Nu?

— Ŝi havas amindumanton.

La ŝerco ĉagrenis ŝin, ĉar ŝi malvolonte diris:

— Amindumanton, kiu estas nigra kiel diablo.

— Jes, li estas nigra, — daŭrigis ŝerce *Pujol*, — tamen li estas bele-brava fraŭlo. Kaj riĉega, li estas mastro de la plej granda kafejo kaj li estas la unua el la kafokomercistoj. Ni iros al li morgaŭ; vi mem vidos, kia luksulo li estas.

— Tio ĉi estos interesa.

— Precipe por tapiŝoj, dolĉaĵoj kaj bagatelaj komercaĵoj li elspezas grandan amason da mono. Mia edzino ofte horojn pasigas ĉe li, kaj, se mi ne malpermesus severe al li, la bona *Mulud* alportus tien ĉi iom post iom ĉiujn siajn havaĵojn — nur pro tio, ke tiu ĉi aŭ tiu objekto gajnis la plaĉon de la *milady*, kaj tial — kiel *Mulud* diras — ĝi meritas, ke

ĝi apartenu al ŝia sinjorina moŝto. Tio ĉi estas la orienta ĝentileco.

— Kia troeco! — interrompas subite sinjorino Pujol, kiu videble ne estis en la plej bona humoro.

— Haha!

— Ne kredu, sinjoro, ke la bela Mulud estas al mi alia ol ĝentilulo. Kaj mi jam en la lastaj 14 tagoj ne estis en lia domo. Sed mia edzo havas la kutimon ŝercadi min pri la tiel nomata amindumanto.

— Jes, kaj mia edzino nun ne toleras ŝercon, — parolas Pujol, — ĉar ŝi perdis hodiaŭ unu el siaj oreloj.

— Vere mi bedaŭras ĝin, — aldonis la sinjorino. — La tutan antaŭtagmezon mi serĉis ĝin, sed vane, mi ne trovis la nigran perlon. La oreloj, kiun mi ricevis de mia edzo, mi tre amis. Juĝu vi mem, ĉu mi ne havas kaŭzon je la malĝojo?

Mi paŝis pli proksimen al ŝi kaj mi konstatis, ke — sinjorino Pujol disigas agrablan bonodoron kaj ŝi havas ĉarmajn orelojn. La perlo, laŭ ĝia paro, estis grandvalora.

Ni babilis ankoraŭ iom da tempo, kaj poste, ĉar la suno staris alte, laŭ Aden'a moro mi iris sur la supraĵon de l' domo por dormi.

*

La alian tagon, en akompano de mia amiko, mi vizitis la amindumanton de sinjorino Pujol. Mulud-ben-Said estas arabo, kafokomercisto kaj multobla milionulo.

Ni sidigis ĉe li kune kun unu nia samlandano, kiu dum lia ĉirkaŭterglobo vojaĝo alvenis en Aden'on. Li estis esploristo, fervora antikvisto, li kopiis ĉiun surskribon kaj viveme li korespondadis kun akademianoj. Mulud, kiu tiel bone parolis angle, kvazaŭ li estus naskita en la Londona *City*, akceptis nin kun distinga ĝentileco kaj invitis nin en lian loĝe-

jon por ĝui nigran kafon, pipfumon, ĉampanon, limonadon. Ankaŭ kruĉo da freŝa akvo estis metita sur la tablo.

Stranga! La akvo ne estis tute pura, tamen ĝi havis agrablan guston kaj odoron... jes, mi ne trompigis... ĝi estis simila al violo.

Ankaŭ la scienculo rimarkis tion ĉi, ĉar li, post ripetita gustumado diris al mi:

— Tiu ĉi akvo havas strangan guston, ĉu ne vere?

— Jes, similan al violo.

— Jes, sinjoro, similan al violo. Nu, sinjoro, ekzistas tiaspeca karbo, kiesodoro estas iom simila al tiu de violo. Estas supozebla, ke tiu ĉi akvo devenas el proksimo de karboj. Ĉu vi povas diveni la eblecon? karbaro en Aden, kie oni bruligas nur karbojn alportitajn el Anglujo!... Sinjoro, ĉu vi povas kompreni tion ĉi?

La scienculo nun komencis persekuti la dommastron per demandoj.

— Ni portigas ĝin el malproksime.

— Tutegala! mi aliros! mi esploros!

Kaj li plenverŝis el la akvo boteleton por ke li ĝin analizos. Estis al mi rimarkebla, ke al la dommastro ne plaĉis la afero.

Ni volis jam diri adiaŭon al la ĝentila nigrulo, kiam la soifo min instigis trinki ankoraŭ fojon. Mi verŝis akvon al mi en mian trinkoglason. Tiam mi aŭdis eksonon de ia malmola objekto. Sankta ĉielo! la nigra perlo falis el la kruĉo en mian trinkoglason, — la paro de tiu perlo, kiun mi rigardis sur la orelo de la bela Parizanino.

Ho, kia infaneca estis tiu scienculo kun liaj karbaroj! Kaj mia kompatinda amiko Pujol!

Ha, en la domo, en la luksega ĉambro de la bela arabo mi ektrovas tiun perlon, kiun ŝia sinjorina moŝto perdis el sia orelo... Kaj tiu ĉi bonodoro! Vere, ĝi estas ŝia!

Kion fari?

Nenion. — La ĉeesto de la edzo min detenis de la pli penetra esploro en tiu ĉi stranga afero.

Dume nia scienca samlandano plenigis sian boteleton, mi lerte elkaptis la perlon el la trinkoglaso. Nenir rimarkis tion ĉi. Mi metis ĝin en mian poŝon.

Ni foriris kune el la domo de Mulud. La scienculo iris al la haveno por ekscii, kiamaniere li povos aliri al la fonto de la violodora akvo. Pujol intencis redoni viziton al la ŝipestro, sur kies vaporŝipo ni devos baldaŭ renkonti, — ĉar mi estis tiun tagon forvojaĝonta el Aden.

Mi ĝojis, ke mi restis sola.

Rapide mi iris en la konstruaĵon de l' konzula ofico por diri adiaŭon al sinjorino Pujol.

— Antaŭ ol mi foriros, — mi diris en trankvila, sed severa tono, — permesu al mi, via sinjorina moŝto, ke mi transdonu al vi tiun ĉi perlon.

Ŝi ekkriis ĝojege:

— Mia perlo! kia feliĉa okazo! . . . Kie ĝi estis?

— En la domo de Mulud-ben-Said, — mi respondis kun teruriga ekpalpebrumo, — kie vi ne estis en la lastaj 14 tagoj.

— Vere, mi . . .

— Mia amiko nenion scias pri tio ĉi, dank' al mia lerto.

— Sed, sinjoro . . .

— Estus io superflua diri, ke mi silentos pri la afero. Adiaŭ!

Mi foriris rapide, eĉ ne akceptante ŝian manon, por ke ŝi vidu mian malestimegon.

Sur la ŝipo mi renkontis Pujol'on; tiel senteme mi ĉirkaŭprenis lin, ke li tute miris.

Kompatinda Pujol!

Post du horoj Aden malaperis de antaŭ miaj okuloj.

Hieraŭ sur la bulevardo mi renkontis tute surprize la geedzojn Pujol. Ili ŝajnis pli amplenaj ol iam. Ŝia sinjorina moŝto havis la nigrajn perlojn sur siaj ĉarmaj oreloj.

Ni tagmanĝis kune en la »*Anglais*« kaj ni parolis pri Aden, de kie ili forvojaĝis antaŭ unu monato.

— Apropo'! — diras subite la ekskonzulo, — ĉu vi memoras ankoraŭ la nigran perlon?

— La . . . la . . . nigran perlon?

— Nu, jes; ĝin ja vi ektrovis. Mia edzino rakontis tion al mi.

— Rakontis tion al vi?

— Jes, jes, ŝi rakontis. Sed kial vi silentis antaŭ mi? Vi miris je la trovo, — ĉu ne vere?

Tiu ĉi demando min kompreneble embarasis. Mi respondis ion tian, kion mi mem ne komprenis.

— Vi ne scias ankoraŭ, kion ni eksciis sekve de via trovo?

— Vere, mi ne scias tion ĉi.

— Imagu nur, mia lakeo trovis strangan rimedon de la monkollekto. Li vendadis la banakvon de mia edzino; la nigra perlo transmigris en banakvo en la domon de Mulud-ben-Said. Tamen mi ne povas prezenti al mi, kiamaniere vi ektrovis ĝin.

— Preskaŭ mi englutis ĝin, — mi respondis ridante kaj mi rigardis la belan virinon, kies mil pardonojn mi petis en mia spirito.

— Englutis?

— Jes; ĝi estis en la trinkakvo sur la tablo.

— Ili devigis nin trinki la banakvon! Bona historio!

La belulino ruĝiĝis, — tio ĉi estis pura ruĝiĝo de la malkulpeco. — — — —

Kaj nia scienca amiko, kiu nenion sciis pri la okazintaĵoj, serioze meditis pri la karbaroj, kiuj, laŭ forta verŝajno, estas troveblaj en la proksimo de Aden. Oni do serĉu ilin!

NERVECO.

(De A. Ĉĉĥov.)

Dmitri Osipoviĉ Vaksin, arĥitektisto, revenis el l'urbo en sian somerloĝejon sub freŝa impreso de seanco spiritisma. Devestiginte kaj kuŝiginta en sia izola ĉambro (sinjorino Vaksin forveturis Trojckon), li kontraŭvole rememoris ĉion ĵus aŭditan kaj viditan. Propradirite, tio ĉi ne estis seanco: la vespero pasis nur en parolado pri teruraj aĵoj. La fraŭlino senkaŭze ekparolis je divino pri pensoj. De tio ĉi oni transiris al rakontoj pri spiritoj. Poste oni nerimarkate ekparolis pri fantomoj kaj fine pri vivaj euterigitoj. La sinjoro rakontis pri mortinto, kiu returniĝis en sia ĉerko. Vaksin mem prenis pladon kaj montris al la fraŭlinoj, kiel oni devas paroli kun spiritoj. Li elvokis, inter aliaj, sian onklon Klaŭdion Mironiĉ, kiun li pense demandis: »Ĉu ne estas tempo transposedigi la domon al mia edzino?« Kaj l'onklo respondis: »Ĉio estas bone, se ĝustatempe farata.«

— Estas multe da mistera kaj . . . terura en la naturo . . . — pensis Vaksin, tirante sur sin la litkovrilon. — Teruraj estas ne la mortintoj, sed tiu ĉi nescieco!

Eksonis l'unua horo de l'nokto. Vaksin turniĝis sur l'alian flankon kaj ekrigardis de sub la litkovrilo la bluan lumon de l'nokta lampo. La lumo ŝanceliĝis kaj apenaŭ klarigis la ŝranketon de la sanktfiguroj kaj la grandan portreton de l'onklo Klaŭdio Mironiĉ, pendantan kontraŭ la lito.

— Kion mi faros, se en tiu ĉi duonlumo aperos la ombro de l'onklo? — venis en la kapon de Vaksin. — Ne, tio ĉi estas neeble!

La fantomoj estas superstiĉo de malmaturaj cerboj, tamen Vaksin, malgraŭ tio ĉi, tiris sur la kapon la litkovrilon kaj forte malfermis l'okulojn. En lia imago prezentigis la mortinto, turniĝinta en la ĉerko, rememorigis la feliĉega onklino, aperis la kapo de pendiĝinta kolego, la figuro de droninta knabino . . .

— Kia absurdo! . . . Mi timas kvazaŭ mi estus infano . . . Malsaĝe!

»Tik-tik-tik!« aŭdiĝis la horloĝo de l'muro. El la vilaga preĝejo alportiĝis la sonorado de l'tombeja gardisto. La sonorado estis malrapida, treniĝa kaj kortranĉanta. Sur la

nuko kaj dorso de Vaksin moviĝis malvarma formikaro. Al li ŝajnis ke post lia kapo iu malrapide spiras, kvazaŭ l'onklo eliris el la kadro kaj kliniĝis super la nevo . . . Vaksin ektimis. Li kunmetis la dentojn kaj detenis la spiradon. Fine, kiam tra la malfermita fenestro enflugis skarabo, kiu ekzumis super lia lito, li ne povis plu teniĝi kaj forte ektiris la sonorileton.

— Demetri Osipoviĉ, *was wollen Sie?* aŭdiĝis post la pordo la voĉo de la guvernantino.

— Ha, tio ĉi estas vi, Rozalia Karlovna? ekĝojis Vaksin. — Kial vi vin maltrankviligas? . . . Ĉu Gavriilo ne povas veni?

— Gavrilon vi mem forpermesis en la urbon, kaj Glafira ankaŭ foriris . . . Neniu estas en la domo . . . *Was wollen Sie doch?*

— Mi, fraŭlino, mi volis diri . . . vi . . . Sed eniru, ne ĝenu vin! . . . ĉe mi estas mallume . . .

En la dormoĉambro eniris la dika kaj ruĝavanga Rozalia Karlovna kaj haltiĝis en atenda pozicio.

— Sidiĝu, fraŭlino . . . Mi volas diri . . . »Kion mi diros al ŝi?« — ekpensis Vaksin, malrekte rigardante la portreton de l'onklo kaj sentante ke li iom post iom trankviliĝas. — Mi propradirate volis vin peti ke se Gavriilo iros morgaŭ l'urbon, vi ne forgesu ordoni ke . . . jes . . . ke li aĉetu cigaretajn tubetojn . . . Sed sidiĝu!

— Tubetojn? Bone! . . . *Was wollen Sie noch?*

— *Ich will* . . . Mi nenion *will*, sed . . . Sed sidiĝu! Mi ankoraŭ ion elpensos.

— Estas malkonvene al fraŭlino sidi en vira ĉambro. Mi vidas ke vi, Demetri Osipoviĉ, estas petolulo . . . mokulo . . . Mi komprenas . . . Oni ne vekas por tubetoj . . . mi komprenas.

Rozalia Karlovna turniĝis kaj eliris. Vaksin, iom trankviligita de l'interparolado kaj hontante pro sia timeco, surtiris la litkovrilon sur la kapon kaj fermis l'okulojn. Ĉirkaŭ dek minutoj li sentis sin bone, sed poste rekomencis l'antaŭa absurdeco. Li kraĉis, prenis l'alume-

tojn kaj, ne malfermante l' okulojn, lumigis kandelon. Sed la lumo ne helpis. Al la tima imago de Vaksin ŝajnis ke iu rigardas de l' spegulo kaj ke l' onklo palpebrumas.

— Mi rec sonoros al ŝi — ke ŝin prenu la diablo! — decidis li. — Mi diros ke mi estas malsana . . . Mi demandas la boteleton de gutoj

Vaksin sonoris. Nenia respondo. Li ree sonoris. Responde li aŭdis sonojn de l' tombejo. Kaptita de timo kaj sentante malvarmon, li rapidege elkuris el la ĉambro kaj farante krucosignojn kaj mallaŭdante sin pro sia malkuraĝo, li nudpiede kaj en suba vestaĵo alkuris al la ĉambro de l' guvernantino

— Rozalia Karlovna! — diris li tremvoĉe, frapante la pordon. — Rozalia Karlovna! ĉu vi . . . dormas? Mi . . . mi estas . . . malsana . . . gutojn!

Nenia respondo. Ĉirkaŭe regnas silento.

— Mi vin penas . . . ĉu vi komprenas? Mi petas! Al kio tiu ĉi . . . ceremonieco, precipe se oni estas . . . malsana? Kiel vi estas *zierlich-manierlich*! En via aĝo . . .

— Mi rakontos tion ĉi al via edzino . . . Vi maltrankviligas honestan fraŭlinon . . . Kiam mi estis ĉe barono Anzig, kaj la barono venis al mi por alumetoj, mi komprenis . . . mi tuj ekkomprenis, kiajn alumetojn li volis . . . kaj mi rakontis al la baronino . . . Mi estas honesta fraŭlino!

— Al la diablo vian honestecon! Mi estas malsana . . . mi petas gutojn! Vi komprenas? Mi estas malsana!

— Via edzino estas brava, honesta virino, kaj vi devas ŝin ami. Mi ne volas fariĝi ŝia malamikino.

— Malsaĝulino, jen kio vi estas! Ĉu vi komprenas — malsaĝulino!

Vaksin sin apogis al la fosto, krucigis la manojn kaj atendis la foriĝon de l' timo. Reiri en la ĉambron, kie lumtremis la lampeto kaj el la kadro rigardis la onklo, li ne havis for-

ton, — sed stari en suba vestaĵo ĉe l' pordo de l' guvernantino estis maloportune en ĉiuj rilatoj. Kion fari? La horloĝo eksonis du, kaj la timo nek foriĝis nek malgrandiĝis. La koridoro estis malluma kaj en ĉia angulo rigardis nigraĵo. Vaksin turniĝis kun la vizaĝo al la fosto, sed tuj al li ekŝajnis ke iu facile tiris lian ĉemizon kaj tuŝis la ŝultron

— Pesto kaj infero! . . . Rozalia Karlovna!

Nenia respondo. Vaksin maldecideme malfermis la pordon kaj enrigardis la ĉambron. La virtoplena germanino trankvile dormis. La malgranda lampo lumigis la reliefojn de ŝia plenpeza korpo, spirinta sanon. Vaksin eniris kaj sidigis sur la plektan keston apud la pordo. En l' alesto de kreitaĵo, kvankam dormanta, sed viva li sentis sin pli facile.

— Ŝi povas dormi, tiu ĉi germanino, — pensis li. — Mi iom sidos tie ĉi; ĉe l' mateniĝo mi eliros . . . La mateno venas frue . . .

Atendante la ĉielruĝon, Vaksin kuntiriĝis sur la kesto, supogis la kapon sur la manon kaj enpensiĝis.

— Jen kio estas nerveco! Homo klera, meditema, kaj tamen . . . ha, diablo, mi hontegas.

Aŭdante la pacan kaj regulan spiron de Rozalia Karlovna li tute trankviliĝis . . .

La sesan horon de mateno l' edzino de Vaksin revenis, kaj, ne trovinte l' edzon en la dormoĉambro, direktiĝis al la guvernantino kun l' intenco preni malgrandan monon por pagi la veturigiston. Kiam ŝi estis enirinta, ŝi ekvidis la sekvantan scenon: sur la lito dormis Rozalia Karlovna etendiĝinta en malordo pro la varmeĝo, kaj en distanco de tri metroj, sur la kesto, ŝia edzo kuntiriĝinta kolubromaniere ronkis kiel sanktulo. Li estis nudpieda kaj en la suba vestaĵo. Kion diris l' edzino, kaj kiel malsaĝa estis la fizionomio de ŝia edzo post lia vekigo, mi lasas tion ĉi priskribi al aliaj. Mi, konfesante mian malpotencon, demetas l' armilon.

Tradukis

A. Kofman.



DONA-BLANKA.

*Sur la tero de l' kastelo
Dona-Blanka staras sole,
Ŝia roz-buŝeto plendas
Kaj ŝi diras senkonsole.*

*La riĉec' de don-Enriko
Forte min al si katenas,
Sed karesoj de grizulo
Fi, mi ilin abomenas.*

*La insignoj de don-Pedro
Havas tian fierecon!
Sed li estas tre malriĉa,
Mi ne amas malriĉecon.*

*Kaj Ramir'! Ha, la belulo,
Li brilegas kiel krono!
Tamen al li estas manko
De insignoj kaj de mono.*

*Ve, en unu vir' ne estas
Ĉiuj vortoj en kombino,
Kaj por tio ne sufiĉas
Unu edzo al virino.*

*Tiu ĉi belega trio
Estus al mi plen-sufiĉa:
Se mi ilin edziniĝus,
Mi vivadus tre feliĉa.*

*Tiam min Enriko ravus
Per juveloj kaj bienoj,
Pedro per fier-insignoj
Kaj Ramir' per ĉirkaŭprenoj.*

AMIKO.

DIVERSAJĴOJ.**Alvoko.**

La 24-an de marto 1902, la Societo »*Espero*« festos la dekjaron de sia ekzistado, kaj ĝia komitato petas ĉiujn estimatajn Esperantistojn, kiuj havas materialojn aŭ dokumentojn por la historio de l' Societo, sendi ilin al s-ro V. A. Kurmanajev, en S.-Peterburgo, Kriukov 27, loĝ. 6.

En la biblioteko de »*Espero*« mankas la sekvantaj verkoj: 25, 27, 37, 38, 40, 50, 69, 70, 99, 100, 112, — »*Esperantisto*« de 1892, 1894 kaj 1895. Se iu ajn havas ilin kaj volas vendi, estu bonega sciigi s-ron Kurmanajev laŭ suprenomita adreso.

K. Ostanieviĉ
prezidanto de la Societo »*Espero*«.

POŝTA KESTO.

Al s-ro ^{rimo}? »Scivola.« — **Respondo.***

Mi dankas Vin, ke Vi igis min ekplenumi pli rapide mian devon.

Kvankam nun mi havas multon da persona kaj esperanta laboro, mi penados tuj kontentigi vian scivolecon, kiam mi kolektigos la tutan necesan materialon.

Sed ĉu ne estus pli bone por nia afero kaj ni ambaŭ, se Vi demandus min letere aŭ persone, antaŭ enpresado de »demando«, kia estas la kaŭzo de mia silentado? ĉar inter honestaj homoj anonimaj presitaj demandoj kaj anonimaj leteroj havas egalan valoron.

Mi estas ankaŭ scivola, ĉu post la enpresado de l' kalkula raporto, Vi forprenos vian maskon?

K. Ostanieviĉ.

* Tiu ĉi artikoleto venis iom malfrue por nia antaŭa numero.
La Red.

HUMORAĴO.

Malfeliĉa muzikantino.

- Ĉu vi vere tre amas la ludadon je fortepiano?
- Ho, eksterordinare.
- Kial do vi ĝin ne ludas?
- Mi ankoraŭ ne trovis iun kiu volus min aŭdi.

Amo kaj feliĉo.

- Ĉu estas vere, sinjoro, ke amo kaj feliĉo iradas ĉiam paralele?
- Jes, fraŭlino, kaj kaŭze de tio ili neniam renkontas.

Lernante ĝis la morto.

Profesoro de gramatiko, mortiĝanta, sin turnas al siaj lernantoj, kolektiĝintaj ĉirkaŭ lia lito:

— Miaj karaj filoj, la morto proksimiĝas al mi, aŭ, pli bone, mi proksimiĝas al la morto, — ambaŭ frazoj povas esti uzataj . . .

Kaj li mortis.

Logiko.

- Ĉu vi ne deziras edziĝi?
- Ne.
- Kial?
- Ĉar mi vivus ĉagrenata.
- Kial?
- Ĉar mi estus jaluzema.
- Kial?
- Ĉar mi estus trompata.
- Kial?
- Ĉar mi estus meritinta.
- Kial?
- Ĉar mi estis edziĝinta.

Ĝusta kaŭzo.

— Kial tiu via amiko, kiun vi konatigis al mi hieraŭ, havas tiel malgajan mienon?

— Ĉar antaŭ tri jaroj li enamiĝis je fraŭlino eleganta kaj bela, kaj volis edziĝi je ŝi, kaj . . .

— Kaj ŝi ne volis?

— Kontraŭe, ŝi konsentis, kaj li edziĝis je ŝi.

La kontraŭdiro.

La edzo: La vivo estas plena je kontraŭdiroj.

La edzino: Tio ĉi ne estas vera.

Sensaĝulaĵo.

— Ha, vi estas granda sensaĝulo!

— Mi kredas . . . kaj pruvis tion ĉi mia ideo edziĝi je vi.

A. C. Coutinho.

Ni petas niajn abonantojn ankoraŭ nepagintajn, ili volu ensendi al ni la abonmonon (ankau la ŝuldan por la jaro 1900) kiel eble plej baldaŭ.

Tiuj inter niaj rusaj amikoj, al kiuj estas neoportuna sendi monon eksterlanden, povas sendi la abonon al nia estimata ĉefo D-ro L. Zamenhof en Varsovio, ul. Dzika N^o 9.

En Francujo s-ro René Lemaire, sekretario de la Societo por la propagando de Esperanto, en Epernay (Marne), akceptas abonmonon ankaŭ por nia gazeto.

Tiujn estimatajn abonantojn, kiuj adresas ian demandon al la administracio de nia gazeto, ni petas, ili volu havi la bonecon aldoni internacian respondan poŝtkarton de sia lando por la respondo.

Adresaro de niaj abonantoj.

(Novaj aliĝoj.)

Aŭstrujo:

Václav Kovanda, maŝinmajstro en la presejo de K. Habicht, en Brunn, Příční ul. 24. (Moravujo).

Bulgarujo:

Ĥristo Ĥaralambev, kvartalo „Sv. Nikola“, urbo Veliko-Tirново.

Danujo:

J. B. Hjorth, Peder Skramgade 26. I., en Kopenhavn.

Francujo:

Emile P. Gasse, *Le Havre*, 33, rue de la Paix. André Moufflet, *Paris*, 10, rue Brémontier, 17-ème arrondissement.

Firmo Badet, Clément kaj K^{io}. *Dijon*.

L. C. Vernier, *Paris*, 10, rue de Chateaudun.

Kanado:

A. P. Beauchemin, sténographe, Greffe de la Paix, Bureau de Police, *Montréal*.

Rusujo:

Gavr. Konst. Kassandrov, St. Koljeno, Saratovskoj gub.

Vacher, Nowgorod, Realnoje Uczyliczce.

- L. G. Solodarin, *Rachni-Lesovije*, Podolskoj gub., Szpikovskij aptecznyj sklad.
 G. F. Solovjev, Russko-Kitajskij bank, *Port-Artur* (Azio).
 Nik. Nik. Budajevskij, inĝeniero, Upravlenie-Mosk-Kievo-Voron. ŝel. dor., *Kursk*.
 V. A. Zablotskij, St. *Michajlo-Semenovsk*, Amurskoj obl.
 Vladimir Alexandrovič Atlasov, *Rjazanj*, Kur-ganskaja ulica, dom Sokolovoj.
 Henryk Niemojewski, dom handlowy »Progres«, ul. Długa N^o 32, *Warszawa*.
 S-rino Elena Nikolajevna Nikolajevskaja, dom Gorodkova, *Morŝansk*, Tambovskoj gub.
 M. K. Lozicki, kontora E. Tilmans & C^o, *Vladivostok*, Primorskoj obl.
 Vladimir Nikolajevič Visockij, *Aulie-Ata*, Sir-Darjinskoj obl.
 Serop Isaakovič Seferov, selskij vraĉ., *Arma-vir*, Kubanskoj obl.

Svedujo :

- A. Johansson, 26, Smålandsgatan, *Stockholm*.
 Axel Widén, 7—9, Parmmätaregatan, *Stockholm*.
 Gustaf Roibard, *Skattungbyn*.

oo

== **Malfacilaŭdemeco.** Riĉa Sinjorino, kiu estis kuracita per la Artaj Oreltamburoj de D-ro Nicholson, donacis al la Instituto la sumon da **Kr. 25,000**, por ke surdaj aŭ malfacilaŭdemaj personoj, kiuj ne havas la rime-dojn akiri tiajn, ricevu ilin senpage. — Leterojn oni volu adresi al: *Instituto Nicholson, »Longcott«, Gunnersbury, London, W.*

Informejo de esperantistoj.

Rajtigita de la Societo »*Espero*«, la membro-korespondanto *E. V. Radwan Ripinski* (Rusujo, Lodejnoje-Pole, de Olonecka gub.) varbas de ĉie societanojn por la nomita Societo, petante la esperantistojn sendi al li jaran membropagon (5 frankoj, — kaj por poŝtaj elspe-zoj: de rusoj 72 centimoj, de alilandanoj 1 fr. 25 c.) post kies ricevo li tuj elsendas rekomendite la kvitancon kaj la Societo siavice sendos la bileton al la nova societano.

Kolektante ilustritajn poŝtkartojn, prezentantajn etnografian intereson, kiuj, por propagandi lingvon Esperanto, estos de mi poste ekspozitaj publike, mi petas ĉiujn geesperantistojn transsendadi al mi tiajn kartojn, precipe kolorigitajn kun tipoj en vestoj naciaj. Oni volu samtempe alskribi apud ĉiu vidaĵo necesajn klarigojn. Mia nuna adreso: Varsovio (Rusujo), ulica Zurawia 34.

Wacław Woyde.

Rebusoj.

I.

— De *Paul de Lengyel.* —

Mi ne estas videbla, sed aŭdebla, tamen oni povas min lumigi. Sed en lumigita stato mi kaŭzas al vi doloron.

II.

— De *A. C. Coutinho.* —

es **J** oo

III.

— De *E. Mankovskaja.* —

5 ac 5 ac 5 ac 5 ac **taj R**

IV.

— De *Josefo Miletz.* —

A A E E M M
 M O O O O
 O O O O
 R R R R
 R R
 R

La literoj estu tiel kombinitaj, ke ili, legataj de maldekstre al dekstre aŭ de supre al malsupre, donu sekvantajn substantivojn: 1. kapableco de la spirito, 2. homa eco, 3. granda akvo, 4. mineralo, 5. kaj 6. litero.

La solvojn de tiuj ĉi rebusoj ni presos en la n-ro 9. Ni petas tiujn inter la legantoj, kiuj sin interesas pri tio, ke ili alsendu la solvojn al la administracio de nia gazeto. La nomoj de la solvintoj ni presos kune kun la solvoj mem.

Oni povas ankoraŭ ensendi la solvojn de I rebusoj trovataj en la n-roj 2—3—4 kaj 5.

Solvoj de la rebusoj trovataj en la n-ro 1: I. Lekanto, II. Postulo, III. Junularo, IV. Tabako.

Solvis ĉiujn rebusojn: E. Mankovskaja kaj A. C. Coutinho; ne ĉiujn rebusojn: Josefo Miletz, fr-ino Caroline Wieslander, Luĵoviko Mihalovich, N. Studenov, I. E. Moskovĉenko, N. Pavlovskij, V. Gedroic.



MI KOLEKTAS

uzitajn eksterlandajn poŝtmarkojn. Mi do petas la amikojn Esperantajn, ili volu sendi tiajn al mi. Mi estas preta je reservo, oni nur skribu, kiamaniere mi povas fari tion ĉi.

Josefo Miletz
poŝtolicisto,
Budapest, IX., Dandár-u. 26. l. 12.
Hungarujo.

Finlandaj esperantistoj,

kiuj intencas akiri amatorajn fotografiajn aparatojn, estas petataj observi, ke tiaj, kune kun necesaj hemiaĵoj kaj uziloj, estas akireblaj ĉe ni je moderaj prezoj, krom kio al esperantistoj estas permesata rabato da 5%.

Postulu kostotabelojn!

Jyväskylä Rohdoskauppa
en Jyväskylä.

GRUPO DE ESPERANTISTOJ

(58 personoj, fotografitaj en 1896: Beaufront, Borovko, Gernet, Kanalossy-Lefler, Kofman, Langlet, Lemaire, Ostrovski, Trompeter, Zamenhof k. c.) estas mendebila po **3 rubloj** anstataŭ 6 rubloj, ĉe la administranto de »Lingvo Internacia«

PAUL DE LENGYEL
Szegzárd, Hungarujo.

Por la pakajo kaj poŝta sendo — 1.50 rublon.
1 rublo = 2 skand. kron. 2.25 german. markoj = 3 frankoj = 3 aŭstr.-hung. kron.)

Rusaj esperantistoj sin turnu al la pretiganto
J. JIVOTOVSKI, en ODESSA
(kursoj de stenografio)
por la pakajo kaj poŝta sendo ili pagas 1 rublon.

LA NOMARO

de ĉiuj nun riceveblaj verkoj de la literaturo Esperanta sin trovas en la broŝuro N^o 140 (Adresaro, serio XXI); oni povas ricevi tiun ĉi broŝuron ĉe

D-ro L. Zamenhof

(Varsovio, str. Dzika N^o 9) sendinte ĝian koston aŭ per mono (45 centimoj kun transsendo) aŭ per signoj de poŝto de kia ajn lando (60 centimoj).

Plenaj jarkolektoj de la Lingvo Internacia (1900) estas riceveblaj de ni

je duonprezo.

Kosto: 2 skand. kron. = 2.75
hung. kron. = 2.88 frankoj =
1 rublo = 2.25 germ. markoj.

Paul de Lengyel
administr. de la Lingvo Internacia
en Szegzárd.

L. I. 1899.

Sinjorojn esperantistojn, kiuj ĝis nun ne pagis la abonon kaj la anoncojn por la jaro 1899, mi tre petas sendi la monon al mi.

Hjalm. Bäckström,
Örnsköldsvik (Svedujo).

Rim. Restantaj jarkolektoj de L. I. 1899 ne estas plu riceveblaj de mi.